

Kun Michel FRÉSARD pri la legolibro
Faktoj kaj Fantazioj - de Marjorie Boulton
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.03.01.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-164/Radiokasedo-164-5-86-B-1022-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-Pri-la-legolibro-Faktoj-kaj-Fantazioj-de-Marjorie-Boulton.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond kaj Michel Frésard nome de Svisa Radio Internacia.

Grandan parton de nia profesia okupo ni dediĉas al la organizo de Esperanto-kursoj por komencantoj aŭ progresantoj. Tial ĉiam tre interesas nin la novaj lernolibroj aŭ legolibroj, kiuj neniam sufiĉe abundos en nia libro-servo. Sed tamen dum la lastaj jaroj niaj verkistoj komencis dediĉi parton de sia talento por helpi al la esperanto-komencantoj. Unu el ili estas la sviso Claude PIRON aŭ Johan VALANO. Liaj romanoj por esperanto-komencantoj tiel fureore vendiĝis, ke ili elĉerpiĝis el niaj stokoj en kelkaj semajnoj. Espereble la libro "Faktoj kaj Fantazioj" de Marjorie BOULTON konos la saman sukceson. Tiu progresiga legolibro, kiun eldonis UEA en 1984, altiros hodiaŭ nian recenzan atenton. Marjorie BOULTON klarigas sian celon en sufiĉe longa enkonduko, kiun ŝi titolas "Antaŭklarigo". Ni tre resume citu ŝin:

M.- "Ĉi tiun libron mi destinis, ĉefe, por legantoj, kiuj apartenas al la kategorio de 'progresantoj'. Ne eblas difini tiun kategorion kun zoologia precizeco; sed certe ĝi inkluzivas tiujn, kiuj finis unuan, elementan kurson pri Esperanto, kaj deziras plueniri: kiuj, do, posedas, espereble, sufiĉan gramatikon, por kompreni, kiel konstrui ordinarajn frazojn, kaj sufiĉajn vort-radikojn, por havi materialon, el kiu konstrui ion. Iliaj sekvaj taskoj estas: tiel ekzerci sin en sintakso, ke ili iĝos kapablaj legi, skribi kaj paroli sen konstanta konscia atento al reguloj, kiujn ili konstante aplikos; provizi sin per vortostoko, kiu liberigos ilin de lingva infaneco..." [p. 7]

Cl.- Marjorie BOULTON celis sufiĉe vastan publikon:

M.- "...Ne aperos ia dekreto, limiganta la uzon de Ĉi tiu libro nur al novebakitoj, al tiuj, kiuj ĵus finis elementan kurson. Ekzistas en la mondo kelkaj esperantistoj, kiuj antaŭ sufiĉe longa tempo bakiĝis en la milda forno de elementa kurso, sed kiuj ankoraŭ ne... gratenis sin..." [p. 7]

C1.- Marjorie BOULTON proponas taskaron por tuta jaro:

M.- "...la gvidantoj de progresigaj kursoj trovos la libron utila, sed mi celas ankaŭ niajn multajn, ofte laŭdirinde progresemajn, aŭtodidaktajn kaj izolitojn. La divido en 52 ĉapitroj celas plejparte ĉi tiujn - jen ĉiusemajna tasko, por privata studojaro. Sed ĉiu instruisto aŭ memlernanto elpensos detalojn de praktika uzado laŭ sia bontrovo, en sia situacio..." [p. 7]

C1.- Marjorie BOULTON volis ion universalan:

M.- "...Mi deziris verki legolibron universalan kaj neŭtralan... ĉiu el ni restas limigita per individua vivospertado. Tio, kion mi tamen vere tre penadis fari, estas, verki libron laŭ miaj limigitaj kapabloj mondrigardantan: almenaŭ ĉerpi fabelojn kaj mirindaĵojn, homajn atingojn kaj kuriozaĵojn, el ĉiuj kontinentoj kaj multaj landoj; respektive aludi plurajn religiojn; iom sugesti la multecon de diversaj bonintencaj vivostiloj en nia mondo. Mi esperas, ke, celante ian kulturan universalecon, mi ofendis aŭ vundis neniun. Miaj intencoj estas amikaj al ĉiuj..." [p. 8]

Cl.- Marjorie BOULTON celis vortriĉecon, kaj tiurilate ŝi pravas. Tro da porkomencanta literaturo restigas la komencantojn en ilia vortmalriĉeco. Tia ne estas la libro "Faktoj kaj Fantazioj”:

M.- "... porkomencanta poŝvortaro tute ne indikas la veran kulturan riĉecon de Esperanto. Mi do konscie penis puŝi la leganton ekster la poŝvortaran palisaron... Mi esperas, ke ĉi tiu libro per plezuro puŝos al progreso."

Cl.- ĉiu semajna tasko ricevis titolon. Laŭtleĝo de kelkaj el ili donos ideon pri la varieco de la legaĵoj proponitaj al la progresantoj :

M.- "Faktoj kaj Fantazioj", la titolo de la libro ankaŭ estas la titolo de la unua tasko.

Cl.- La postaj taskoj titoliĝas :

M.- "Du fabeloj el Ganao", "Proverboj", "Fablo el Tibeto", "Kiel utila Esperanto jam estas ! ", "Geedza dialogo", "Fabelo el Etiopujo", "Unuaj plumamikoj, parto unua", "Fabeloj el Aŭstralio", "Unuaj plumamikoj, parto dua", "Fabelo el Nepalo", "Testamentoj", ...

Cl.- Ktp, ktp. Glosaro konkludas tiun libron kaj ĝi komenciĝas kun tiuj ĉi klarigoj, kiuj bone spegulas la sintenon de Marjorie BOULTON:

M.- "Vortaro estas libro nepre necesa por ĉiu serioza lingvolernanto. Sed ne ĉiu esperantisto povas frue akiri bonan grandan vortaron. Tial mi decidis provizi la leganton per glosoj pri vortoj kiuj, kvankam jam akceptitaj esperantaj vortoj, eble ne troviĝas en tiu esperanta-nacilingva vortaro, kiun la leganto jam disponas... Ĝenerale, mi ne glosas vorton, kiun mi detale difinis en la teksto. Mi uzas simplajn, foje iom trosimpligitajn, difinojn, ĉar pli sciencaj difinoj per eĉ pli maloftaj vortoj ne tre helpis ĉi tie."

Cl.- La trafoliumanto tuj rimarkas, ke la taskojn konkludas mallongaj, ofte ŝercaj tekstoj. Kaj ni konstatis, ke la eklegantoj, antaŭ ol iom sisteme trastudi la libron, unue interesiĝas pri tiuj finĉapitraj allogaĵoj. Ni faru kiel ili. Fine de la dua tasko ni loegas :

M.- "Dom-mastrino lasis tiun ĉi noton por la laktisto: LAKTO. Mi ne bezonas lakton hodiaŭ. "Hodiaŭ" signifas "morgaŭ", ĉar mi skribis ĉi tiun noton hieraŭ. " [p.29].

Cl.- Kaj jen fine de la oka ĉapitro:

M.- "Ni deziras dungi plurajn JUNULINOJN por paki fiŝojn ĉirkaŭ 16-jarajn."

Cl.- Aliaj tekstetoj estas pensigaj. Jen fine de la 16-a tasko:

M.- "Pensiga Statistiko. Serioza medicina esploristo, post longa studado de statistikoj el Usono, venis al jena konkludo: el ĉiuj mil junaj geusonanoj, kiuj persiste fumadas, probable unu mortos murdita ; ses mortos pro strat-akcidentoj; kaj ĉirkaŭ 250 mortos pro malsanoj, kiujn kaŭzas tabako." [p. 141].

Cl.- Fine de la 40-a tasko ni perdas iluzion pri ni mem:

M.- "La plej subevoluinta teritorio en la mondo trovigas - sub niaj ĉapeloj." [p. 323].

Cl.- Dankal la libro "Faktoj kaj Fantazioj" multaj tutcerte agrable progresos akirante riĉan vortaron. La kursgvidantoj malpli penos por proponi legtaskojn al la progresantaj lernantoj. Dankon al Marjorie BOULTON kaj al UEA por tiu utila instrumento, kiu malhelpos multajn resti eternaj komencantoj.

M. - Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia.

C1.- Claude GACOND

M.- kaj Michel FRESARD prezentis al vi la progresigan legolibron "Faktoj kaj Fantazioj" de Marjorie BOULTON.

Cl.- Ĝis venontsabate!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*